n-ro 94

oktobro 2007

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Proceduro por estrarelektoj finiĝis

Ĝis la 15a de junio 2007 ne alvenis voĉdonoj ĉe s-ro F.J. Braun. La eksiĝantaj estraranoj Hornecker, Kniess Mates, Ooba kaj Rotsaert do estas reelektitaj.

## Helpo por registrado en la membroadministrado

Al la ĉefa menuo de www.ikef.org estas aldonita ero 'membroadministrado-helpo' por gvidi ekzistantajn kaj novajn IKEF-membrojn kiuj uzas la retan membroadministradon de IKEF. Sugestoj por plibonigi tiujn helpinstrukciojn estas bonvonaj. Ili ankaŭ estas sur papero aldonataj al ĉi tiu revuo..

## Enhavo

Universala kongreso en Jokohamo .......................... 3
Venontjara UK en Roterdamo - Ĉina renkontiĝo - Nova indekso .. 4
IKEFa forumo - SAT pri ekonomio - Eurodicautom -
Kees Ruig en gazeto - Traduko de bilancaj terminoj ............ 5
Reta membroadministrado ................................ 6
Komercaj petoj kaj proponoj .............................. 7
Terminologia Centruo de UEA - Membrokotizoj .............. 8



**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare [duonjare ekde 2006] ([jan]-apr-[jul]-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland ROTSAERT. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario: vakas; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; D-ro Achim HORNECKER; S-ro Silvio KNIESS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi. **Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco POLERANI.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio, tel/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)telenet.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). [Tarifoj provizore duonigitaj ekde fino de 2005.] Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo (laŭ plena tarifo). Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c* - www.moneybookers.com (konto=retadreso de kasisto)
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**
*Internacie*: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Brazilo:* Silvio KNIESS MATES (silvio(a)davincibrasil.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)wanadoo.fr

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, paloc1(a)inbox.com

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

*Kroatio*: S-ro Vjekoslav MORANKIĆ, Lipa 40 E, HR-51000 RIJEKA, retpoŝto esperanto.rijeka(a)ri.htnet.hr.

**IKEF-informoj en Interreto**: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

## Universala Kongreso en Jokohamo

### Informkunveno de IKEF

Ĉi-jare ne okazis Ĝenerala Kunveno (jarĉefkunveno), sed informkunveno de IKEF. Profesoro OOBA Atsuo, sola ĉeestanta estrarano de IKEF, povis saluti je la 9a de aŭgusto, 14:15 h, en la salono Mijake 13 membrojn de IKEF kaj 15 interesitojn.

Li klarigis la celojn de la fakgrupo, nome ĝenerale enkonduki kaj akceptigi Esperanton en komerco, ekonomio kaj ekonomiko. Tio okazos detale per subteno de komercado de membroj surbaze de la lingvo Esperanto, kion modele faras la ĉinaj membroj, terminara laboro (verki terminarojn) kaj verki fakajn artikolojn, ĉefe en la revuo MONATO. Oni interkonsentis ke en grandaj mondvastaj entreprenoj, t.n. angle “Global Players”, Esperanto apenaŭ havas ŝancon, ĉar tie regas la angla lingvo. Sed por malgrandaj komercistaj entreprenoj Esperanto povas esti bone uzata en la negocado, aparte en landoj kie la angla ne estas vaste uzata. Do temas pri niĉa komercado.

Ĉefa temo de la kunveno estis la nova membroadministrado de IKEF per Interreto. Eksprezidanto Franz Josef BRAUN prezentis la projekton, kiun la germana firmao Dr. Hornecker (Achim Hornecker estas estrarano de IKEF) efektivigis kaj kiu ĵus antaŭ la UK estis enkondukata en la praktikon. Centra ideo ĉe tio estas, ke ĉiu membro per interreto mem aliĝas kaj enigas kaj daŭre aktualigas siajn datenojn. Ĉiuj membroj havas la rajton viziti kaj rigardi la paĝojn de la aliaj membroj. Per tio ekestu bona interkonatiĝo de la membroj, kio stimulos la interasocian vivon kaj interagadon. La membroadministrado estas integrita parto de la IKEF-retpaĝaro. La ĉefa administranto Roland Rotsaert sole havas la rajton ŝanĝi datenojn se necese aŭ enigi datenojn de membroj sen retaliĝo.

Ekestis inter la ĉeestantoj vigla diskutado, el kio rezultiĝis kelkaj modifoj. Tamen ĉiuj montris kontentecon pri la projekto. Oni difinis ankaŭ tiujn datenojn de la membroj, kiujn rajtas rigardi eksteruloj (ne-membroj, gastoj). Braun alvokis la membrojn, ke ili ĉiam aktualigu siajn datenojn kaj ofte rigardu la paĝojn de la aliaj – nun iom pli ol 120 – membroj kaj prenu kontakton kun ili por eble organizi komunajn projektojn.



### Ŝipveturado en la haveno de Jokohamo

Je la 7a de aŭgusto, 13:30 h, 26 personoj (10 membroj de IKEF kaj 16 interesitoj) kune ŝipiĝis en la haveno de Jokohamo. La japana estrarano de IKEF, profesoro OOBA Atsuo kaj lia edzino estis organizintaj tion. Per subtera fervojo oni veturis du staciojn de la kongresejo proksimen al la haveno kaj de tie oni marŝis la lastajn metrojn al la kajo, kie jam atendis ilin la pasaĝerŝipo. Sekvis unuhora veturado tra la mondfama haveno de Jokohamo, preterpasante kajojn kun grandaj varŝipoj, preterpasante ankaŭ insulojn kun energicentraloj, naftoprilaborado kaj aliaj fabrikoj, sub stratpontoj pli ol mil metrojn longaj, kiuj ligas trans la havenon diversajn urbokvartalojn. La informoj de la gvidantino el japana lingvo bone tradukis Esperanten s-ro Igor Wasilewski, KN 1364. Ĉeestis ankaŭ s-ino WANG Shanshan de Esperanto-Servo de ĈRI (China Radio International) por raporti pri la aranĝo en la ĉina radio. Je la fino la ŝipo liveris la ekskursantojn rekte al la haltejo apud la kongresejo. (raportis F.J. Braun)

## Venontjara kongreso: Roterdamo

La venontjara universala kongreso okazos en Roterdamo, unu el la plej grandaj havenoj de la mondo. Nia membro Kees Ruig jam komencis intertraktadon kun la havenestroj por aranĝi viziton.

## Sukcesa IKEF-renkontiĝo en la ĉina havena urbo Rizhao

La kunveno IKEF-Ĉinio je 15-17 septembro 2007 estis sukcesa. Ĝin partoprenis 34 personoj (plejparte estas komercistoj kaj entreprenistoj el ĉina Esperantujo, krome du uzbekaj kaj unu brazila hazarde ĉeestis la okazon). Oni decidis refoje kunveni en 2008. Baze sur sukceso de IKEF-Ĉinio 2007 la venonta IKEF-Ĉinio 2008 preferas partoprenigi eksterlandajn komercistojn kaj entreprenistojn.

## Franca indekso por Sindikata Terminaro

Unu el la unuaj eldonoj de IKEF estis ‘Sindikata Terminaro’. Papere ĝi preskaŭ ne plu haveblas, sed ĝi estas elŝutebla en la parto ‘Eldonoj’ de www.ikef.org. Jean-Pierre Ducloyer antaŭ kelkaj monatoj faris francan indekson de tiu terminaro (.doc, 336 kB), kiu estas elŝutebla samloke.

**Nova IKEFa forumo**

Pro subita fino de la servo de la provizanto, dum kelkaj tagoj ne plu estis disponebla la IKEFa forumo. Bedaŭrinde la laste alvenintaj mesaĝoj perdiĝis kaj ili do estu - se bezonate - denove sendataj. Por la nova servo estis elektita angla lingvo, ĉar esperanta versio ne tuj estis trovata. Sugestoj bonvenas. Cetere, la nuna provizanto - www.smartgb.com - ofertas la servon en kelkdekaj lingvoj. Eble iu sukcesos konvinki la firmaon aldoni E-version.

**SAT-dosiero pri ekonomio**

En la septembra numero de Sennaciulo, oficiala organo de SAT, aperis interesa dosiero pri kelkaj ekonomiaj temoj: 'Etika vivo, ĉu ebla en kapitalisma mondo?' kaj 'Senmonaj interŝanĝoj, ĉu plu?'. Je la retpaĝoj de SAT (www.satesperanto.org) eblas legi la komencajn paĝojn de la revuo kun parto de la unua teksto.

**Eŭropa Unio: Eurodicautom iĝis IATE**

Eurodicautom, la terminologia datumbazo de la eŭropaj tradukservoj, estas modernigita kaj ampleksigita kaj nun nomiĝas IATE. Rigardu ĝin je http://iate.europa.eu.

**Nederlanda IKEF-membro Kees Ruig en gazeto**

En nederlanda retgazeto DePers aperis longa, ilustrita artikolo pri nia multjara membro Kees Ruig. Fine estas menciita lia profesia kariero: ano de ŝipista familio, ŝipstiristo, eksportrespondeculo por la azia merkato kaj konsilisto pri internacia komerco .
(www.depers.nl/inspiratietour/78143/Over-vijftig-jaar-spreekt-heel-Europa-Esperanto.html)

**IKEF-membro tradukis formularojn de bilanco kaj spezokonto**

Nia membro, d-ro Zlatko HINŠT, disponigis la tradukon de la oficialaj formularoj de financa statistiko de DE INTERNACIA FERVOJA UNIO (UIC) kaj tradukon de la oficialaj formularoj de bilanco kaj spezokonto en Respubliko Kroatio, kiun li prezentis dum la 59-a Internacia Fervojista Esperanto kongreso. Estas i.a. interesa kontribuo al la terminologio pri librotenado. La dokumento estas elŝutebla en la rubriko 'eldonoj' de www.ikef.org (lasta ero). Rimarkoj kaj sugestoj bonvenas.



**Reta membroadministrado de IKEF ekfunkciis**

Lanĉo en junio 2007

Komence de junio la firmao Hornecker dissendis cirkuleron al ĉiuj membroj de IKEF kiuj havas retadreson, por anonci ke la nova membroadministrado estis je dispono de la membroj. La membroj ricevis pasvorton per kiu eblas, tra la menuo de www.ikef.org, kontroli kaj ĝisdatigi siajn informojn, aperigi sian foton, kaj ankaŭ konsulti la ĉefajn informojn de la ceteraj membroj de IKEF.

Kelkaj membroj entuziasme reagis kaj tuj kaptis tiun eblecon. Aliaj estis pli hezitemaj aŭ timis la teknikaĵojn de interreto. S-ro F.J. Braun, eks-prezidanto de IKEF, dum la pasintaj monatoj helpis kaj instigis tiujn por alkutimiĝi al la novaj proceduroj.

Membroj kiu ne ricevis pasvorton aŭ perdis ĝin, povas peti ĝin je ikef(a)telenet.be.

Helpilo je dispono

Por helpi la membrojn dum la preparo de la registrado, al la menuo de www.ikef.org estis aldonitaj helpfolioj kun bildoj kiuj klarigas la proceduron. Tiuj folioj ankaŭ estas aldonitaj al ĉi tiu numero de La Merkato. Utilus ekscii je kiuj lokoj la membroj spertas problemojn, por povi plidetaligi la helpilon.

Ĉar konsiderinda parto de la IKEF-membroj ne havas retaliron, ankaŭ eblas sendi siajn personajn kaj komercajn informojn kaj eventuale foton al Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, BE-8000 Brugge, Belgio. Por tiu povas utili la lasta helpfolio.

Forsendo de La Merkato

Principe ĉiuj IKEF-membroj ricevas dufoje jare paperan ekzempleron de la revueto 'La Merkato'. Nur kelkaj membroj preferas ricevi ĝin nur rete. Ĉar okaze de la transiro de la malnova al la nova datumbazo erare por ĉiuj membroj estis menciite ke ili deziras ricevis la revuon rete, nun ne plu estas klare kiu ricevu kion. Tial ĉi tiu numero estas papere sendita al ĉiuj, krom al tiuj pri kiuj estas certeco ke ili ne deziras ĝin. Se necese, korektu la informon en la membroadministrado.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

Angolo

La presarta entrepreno Nsimba Victor (ankaŭ okupiĝas pri librovendejo, flartabakujo, oficejaĵoj kaj lernejaĵoj, ĝenerala komerco) deziras importi ĉi subajn ilojn:

- RZ350, Duplikatiga diĝita, A6 kaj A3 paperoj, marko: Riso
- C350 kaj DI 5510, diĝita fotokopilo, kolora presilo, skanilo, A3 ĝis A5, marko: Konica-Minolta
- Papero 70*100, 60gr kaj 80gr .
- Kemia papero (papel quimica) 60gr, CF.B, C.B , C.F
- Cocorol papero 90gr
- HC5000, diĝita presilo, marko: Riso
- Ofsetmaŝino, Heidelberg, Einfarben, 46*64cm, 18*25 1/4
- Pikilo pri la oficejaĵoj kaj presiloj, A3 paperoj
- Kartona papero 70*100 kolora 180 gramoj kaj 160 gramoj
- Presa papero 70*100, 60 kaj 80 gramoj

Interesitoj bonvolu sendi al ni katalogojn, fotojn kaj prezojn CIF ĝis nia haveno Luanda - Angola. Kontaktu s-ron Joao Claudio T. Nsoko, rete jc_nsoko(a)yahoo.fr , tel. 00244924020481 , C.P.: 5859 LUANDA - REP. ANGOLA

Belgio

CDline - Softvaro por lingvolernado, tradukado kaj alia.

Jam de pli ol 10 jaroj ni distribuas softvarprogramojn por privata kaj profesia uzo, ĉefe en la kampoj ludoj (ŝako), komputilprotektado, retpaĝarofarado kaj lingvoj (115 lingvokursoj, inkl. Esperanton kaj softvaro por aŭtomata tradukado al 18 lingvoj). Rekta sendo tra la tuta mondo eblas. Ni ankaŭ serĉas distribuistojn por pluraj produktoj, kiel nTracker (komputilprotektado), Evolution (ttt-ejo konstruado) kaj la traduksoftvaro. Vidu www.cdline.be. Bona gajno por aktivuloj eblas.
Kontaktu rob(a)cdline.be por piaj informoj.

Nia hungara peranto havas novan retadreson: paloc1(a)inbox.com.



Germanio

Rainer Kurz (rk(a)rkbc.de) proponas esperantlingvan kalkuladon de la distanco inter du lokoj sur la tero. Vidu http://www.Distanco.GetMyPosition.com. Simple alklaku la du lokojn sur la mapoj. Ekzemploj por la uzado de tio servo servo estas:

o Kalkulado de la distanco al la plej proksima Esperanto kongreso.
o Distanco inter du amikoj.
o Kiel for estas du amikoj.
o Distanco al la landolimo / marbordo.
o Taksado de la spaco inter du radioamatoroj.

**Terminologia Esperanto-Centro (TEC)**

Aperis en la TEC-retejo (http://esperanto.net/tec/wblanke-principoj.html) verko de Wera Blanke: "Terminologiaj principoj de Esperanto". Ĝi estas praktika helpado al tiuj, kiuj verkas kaj revizias teknikajn vortarojn.

**Membrokotizoj**

Ĉi tiu numero estas sendita al ĉiuj membroj kiuj estas registritaj en la nova datumbazo de IKEF, ankaŭ al tiuj kiuj jam de pluraj jaroj ne plu pagis sian kotizon. Bonvolu rigardi vian adresetikedon: supre troviĝas la membronumero kaj la jaro por kiu la lasta kotizo estas pagita.

Mi invitas vin pagi la kotizon (7,50 aŭ 5 eŭroj jare, depende de la landokategorio) laŭ unu el la eblecoj menciitaj je p. 2.

Ĉar estas la unua fojo ke adresetikedoj estas faritaj per la nova adresaro, verŝajne enestas eraroj. Bonvolu komuniki ilin aŭ rekte korekti ilin en la adresaro. La malapero de supersignoj estas konata problemo: ne kulpas la adresaro mem, sed la programoj kiuj filtras la adresetikedojn el ĝi. (rr)